Johann Wolfgang von Goethe,

# Elf-reĝo

*tradukita de Antoni Grabowski*

Kiu rajdas tra nokt', kun vent' pro l' vet'?
Jen estas patro kun infanet':
Li havas knabon en zorga pen',
Lin tenas varme en ĉirkaŭpren'.

"Filet', vi kial ektremis pro tim'?"
"Patreto, jen! elfreĝ' en proksim'!
La elforeĝo, kun vost' kaj kron'!"
"Filet', ĝi estas nebulzon'."

"Ho venu do, infan' al mi!
Mi belajn ludojn ludos kun vi:
Ĉe l' bordo brilas kolora flor',
Mia panjo havas vestojn el or'!"

"Patret', ĉu vi aŭdas, ho mia patret',
Kion promesas elfreĝ' en sekret'?" —
"Ne timu, filet', ne timu vi,
Murmuras vent' en velka foli'."

"Knabeto bela, sekvu min',
La filinoj miaj vartados vin'.
La filinoj, lertaj en danca rond-form',
Kantante, dancante vin lulos al dorm'."

. . .

Johann Wolfgang von Goethe,

# Elfreĝo

*tradukita de Joachim Gießner*

Rajdadas tra vent' kaj noktnebul'
la patro kun febranta etul'.
La knabon firmtenas sur sia sel'.
brakŝirmas lin varme sub mantel'.

"Ho fil', vi tremas, ŝvitperlas la frunt'?"
"Jen, patro, elforeĝ' en profund',
la elforeĝo kun kron' kaj trenaĵ'."
"Filet', nebul' nur kaj arbaĵ'."

"Vi ĉarma knab', ho, venu nun,
ni kune ludos en bril' de lun'.
Kaj buntaj floroj ĝojigos vin,
orajn vestojn havas mia patrin'."

"Ho patro, ho patro, ĉu aŭdas ne vi?
L'elfreĝo dolĉe promesas al mi."
"Karulo, trankviliĝu, infan',
susuras vento tra seka kan'."

"Vi, ĉarma knab', akompanu min,
la filinoj vartos, dorlotos vin.
La filinoj dancos en nokta rondad',
vin lulos kaj kantos por via dormad"'.

. . .

”Patret’, ĉu vi vidas, patret“, mia kar’?
En lok’ malhela jen elfinar’!”
“Filet’, filet’, mi vidas precize: [2]
Maljunaj salikoj ŝajnas jen grize.”

“Mi amas vin, ĉarma vi, mia knabet’,
Se mem vi ne iros, mi prenos sen pet’!”
“Patreto, patreto, li prenas min for!
Elfreĝo kaptas min, ho dolor’!”

La patro ektremis, kun granda rapid’
Li rajdas, kaj plende en brak’ ĝemas l’ id’.
Alvenas patr’ al hejma kort’,
L’ infanon prenis jam for la mort’.

*Traduko de la Germana poemo “Erlkönig” de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Antoni Grabowski *(∗1857-06-11 – †1921-07-04).*

*Arg-588-1694 (2013-02-26 14:50:24)*

“Ho patro, ho patro,” ĝemegas la fil’,
“elfinoj jen kun obskura bril’!”
“Filet’, filet’, ekkonas mi ĝin,
salikoj la grizaj trompas nur vin.”

“Mi amas vin, allogas min via belec’,
kaj se vi ne volas, vin venkos fortec’!”
“Ho, patro, li venas, nun sentas mi lin!
Elfreĝo krude perfortas min.”

Rapid-horora la patra rajdad’ -
en brak’ aŭdiĝas singulta ĝemad’.
Kun pen’ li venas ĝis la kort’,
prenita estas la knab’ - de l’mort’.

*Traduko de la Germana poemo “Erlkönig” de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-588-1242 (2012-10-18 16:09:46)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en* `http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html`. *sub* `http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf`.

[2] Mi, Manfred Retzlaff, proponas por tio, ke la rimvortoj estu – same kiel en la originale – akcentataj sur la lasta silabo, jenan ŝanĝon:
„Fileto, precize mi vida ĝin:
La grizaj salikoj jen trompas vin.“